# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

10a jarkolekto n-ro 5
Junio 1990

Estraro:

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

Komisiitoj:

Financoj: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
Eldonoj: Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen).
Manlibro de la aktivulo: Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53).
Gazetara servo: Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, tlf. (03) 234 34 00).
Rebata servo: Germain Pirlot.
Prelegvojaĝoj: Hilde van Ingelgem (Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11).

Oficejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Malferma principe ĉiun labortagon de 9.00 ĝis 12.30 h. kaj de 13.30 ĝis 17.30 h. Telefono (03) 234 34 00. Telekopiilo: (03) 233 54 33.

# FEL-estraro: protokolo

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Monique Caestecker, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

**Eldona agado:** *Grammaire ABC d'Espéranto* estas nun presata. Tuj poste povos sekvi *La akuzativo en Esperanto* kaj *1887 kaj la sekvo*. La novan libron de Deck Dorval kiel kutime lingve kontrolis Chris Declerck. Li tamen enŝovis ankaŭ plurajn neologismojn. Ĉar ŝajne Chris Declerck ne estas persvadebla forigi ilin, la estraro decidas pludoni la manuskripton al alia lingva revizianto. La nomoj de la reviziantoj ne aperos en la libro. La estraro skribe komunikos tion al Chris Declerck.

**Batos:** La atestoj por la donacintoj estas skribitaj. Fakturoj pagitaj. JV iros al Rumanio kaj pretas kunporti ankaŭ librojn kaj revuojn por la esperantistoj tie.

**Kunlaboro kun Hungario:** MC skribis al Margit Evva. Ŝi venos dum decembro al Belgio kaj tiam ni povos priparoli pli detale.

**Kolektiva abono Esperanto:** BEF proponas apliki tarifon de 500 fr anstataŭ 400 ekde 1991, ĉar la kostoj superas 400 fr. FEL akceptas la proponon.

**Gazetara dokumentujo:** Ni presos 1000 ekzemplerojn kaj vendos ilin tra la libroservo kontraŭ ĉ. 30 fr.

**Kampanjo inter eks-legantoj de** *Esperanto-Panorama*: Entute 16 kursoj estis venditaj kaj 13 vortaroj. Unu mendinto poste resendis siajn ekzemplerojn. La rezulto estas do ĉ. 4%. Finance la kampanjo ŝajnas esti eltenebla. La kostoj sumiĝas 11000 fr. kaj la enspezoj 20000 fr.

**Antaŭa protokolo:** Akceptita.

**Organigramo:** La centro sendu ĝin al la respondeculoj de la diversaj grupoj de FEL.

**Eŭropa kongreso 1991:** Ŝajne prokrastita ĝis 1992 aŭ 1993.

**Estrarkunsido de FLEJA je 2/6/90 ĉe Patrick Haerick en Wondelgem**

Ĉeestantoj: Patrick Haerick, André Ruysschaert, Eddy Van den Bosch, Jean Pierre VandenDaele kaj Philippe Van Damme.

Komenco: 10h45.

1. Antaŭa protokolo

Akceptita ĝi estis post legado kaj jenaj atentigoj.
La Gambrinus-festo en Loveno ne okazis. Nek An nek Peter iris al la IJF en Italio kaj daŭre ne alvenis novaĵoj el Nederlando pri Pasporta Servo. Interŝanĝo kun poloj: ĉar ne plu estas deviga monŝanĝo ni nuligas tiun ĉi interŝanĝon. Eddy petas al Iwona ĝiri la labormonon interŝanĝan al la FLEJA-konto.

2. Financoj

Semajnfino Lokeren:
malgajno entute estas 15000 frankoj.
La tuta arĥivo pri semajnfinoj estu arigita en la arĥivejo en la Esperantodomo.

Bilanco '89:
ĝi nun estas akceptita. La malgajno estas preskaŭ 32000 frankoj.
Por limigi la elspezoj de Koncize kaj JEN ni malgrandigis la nombron de senpagaj abonoj (Koncize) kaj limigis la daŭron al duona jaro (JEN). Nun ĝis fine de tiu ĉi jaro 116 homoj ricevas JEN kaj 36 Koncize.
Tiel la malgajno ĉijara devas esti malpli granda pro malpli da elspezoj revuaj kaj ne malgajno pro semajnfina kongreso.
Eddy transigas la monon de FLEJA de nia UEA-konto al nia depona konto. Eddy informos antaŭ la 1a de julio ĉu eblas investi monon kontraŭ ŝparpruviloj dum du jaroj je nomo de FLEJA kaj subskribo de du rajtigantoj. Tiel ĝi alportos 1 procento pli ol sur nia konto de Kredietbank. Poste ni telefone interkonsentos pri la sumo kaj sub kiaj kondiĉoj.

3. Estontaj kongresoj kun partopreno de FLEJA-membroj

14-28/7/90: IJK/UK en Kubo: André Ruysschaert kaj Peter Ameye.
2/9/90: zonumi ĉirkaŭ Bruselo. Depende de la nombro partoprenanta ni elektas la promendistancon kaj forirlokon. Jean Pierre informos al Esperanto-Panorama kaj Eddy mendos dek biletojn por promenado.
14-19/9/90: KER-seminario de TEJO apud Munkeno: Stefaan Cottenier emas partopreni.
2-4/11/90: BASF-kongreso en Godinne:
ni prizorgas aŭ planas: kuira servo kaj programo: laborgrupo pri tradukado (Stefaan), radioaŭskultado (Jean Pierre), unua helpo (Ilse?) kaj lumbildoj laŭ historio de la ŝtonhakisto (André).

4. Diversaĵoj

Propono de Philippe Van Damme: nova strukturo de la belga Esperantujo. Por JEVA ĝi estas pli interesa sed por ni tute ne

pro pli intima kunlaboro kun FEL dum ke la kunlaboro inter JEVA kaj APE estas barita pro malsamaj opinioj.

SEL (skolta Esperantoligo): ĉi-semajnfine 3000 skoltoj havas internacian semajnfinon en kiu estas disdonataj diverslingvaj informfolioj pri Esperanto presitaj en GCA. Ni pretas pagi la elspezojn faritajn propagandcele ĝis 2000 frankoj. En septembro SEL organizos enkondukan kurson.

Sekvonta estrarkunveno okazos dum BASF-kongreso.

Kiu kion ?
Eddy:
- petas al Iwona ĝiri la interŝanĝan labormonon al nia konto,
- donas semajnfinan arĥivon al Jean Pierre,
- transigos la monon de nia UEA-konto al nia depona konto,
- petas pli da informoj pri ŝparpruviloj,
- mendos 10 biletojn por la zonuma promenado ĉirkaŭ Bruselo.
Jean Pierre:
- informos Guido Van Damme pri la zonumado.

Fino: 12h45. Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.